TELOPEO


Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 50, Numero 2, Februaro 2017*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**

**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Gasto el Singapuro



La 25-an de februaro ĉe Esperanto Domo lokaj Esperantistoj renkontis Frank Stephan, nian gaston el Singapuro. Li estas profesoro ĉe la Fakoj de Matematiko kaj Komputila Scienco de la Nacia Universitato de Singapuro. Frank faris mallongan prelegon pri la historio de Singapuro, la lando kie li nun loĝas.

Singapuro jam ekzistis antaŭ 700 jaroj, sed ĝi iĝis detruita dum la militoj en la komenco de la kolonia historio, kiam la Portugaloj igis Malakaon esti la ĉefa komerca centro en la regiono.



En 1819, la Britoj sub la gvido de Stamford Raffles ricevis la rajton fondi komercan vilaĝon en Singapuro kiu iĝis pli kaj pli granda. Singapuro iĝis Brita militara kaj komerca centro, sed en jaro 1942 la Japanoj konkeris ĝin ege pli facile ol antaŭvidate. Post la dua mondmilito, ĝi ricevis pli kaj pli da enlanda memregistaro kaj iĝis en 1963 parto de Malajzio. Ekde 1965 Singapuro estas memstara lando kaj la ekonomio pliboniĝis kaj ĝi estas hodiaŭ unu el la plej bone evoluitaj regionoj de la mondo.

## Lingvaj Festivaloj




La 11-an de februaro 2017 okazis lingva festivalo ĉe la Manlia Biblioteko. Okazis prelegoj pri la Kalasha, la tamila, la ukraina, la rusa, la bangla. Jonathan Cooper prelegis pri konstruitaj lingvoj. Pri Esperanto prelegis Richard Delamore.



Sekva lingva festivalo okazos en Parramatta sabate la 11-an de marto.
Bonvenon!
Pli da informoj: http://languagefestival.org/parramatta/



Esperanto Federation of NSW

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 manly@esperanto.org.au

Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 newcastle@esperanto.org.au

EFNSW: Estraranoj: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Paul Gorny (02) 9496 0395 Penny Vos (02) 6495 2922
Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic.
Huigh 02 6288 4334 huighm@gmail.com

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 14:00 – 16:00 *(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: nsw@esperanto.org.au



| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Lushnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |

Estraranoj: Richard Delamore, John Casey